

CxEA-Retkomunikoj 1/2003

1. Kalendaro de Esperanto-arangxoj en Cxehxio
2. Tutmonda adresaro de esperantistoj ne plu
3. Videofilmo pri nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard Selten

1. Kalendaro de Esperanto-arangxoj en Cxehxio

ni promesis dissendi en la nuna ret-komunikoj trarigardon de la E-arangxoj en Cxehxio dum cxi tiu jaro. Sed ni ne sukcesis pro kelkaj kialoj. Precipe la planita komuna konferenco de CxEA kaj GEA versxajne ne okazos, cxar dum la sama semajnfino okazos granda solenajxo de BELO (Bavaria Esperanto-Ligo) en Kronach kaj sxajnas al ni maloportune, ke gxi estu en konkurenca rilato al nia komuna konferenco kun GEA. Cxar la okazajxo en Kronach estas ligita al la solenajxo de la urbo mem kaj do ne povas cedi, ni proponis al GEA kaj BELO prokrasti la komunan konferencon al la jaro 2004. Tamen, ni atendos kun la sxovoj de niaj arangxoj gxis ricevo de la respondoj. Do - la kompletan kalendaron ni dissendos en la unua duono de la monato marto.

Sed al la pliaia kialo: ni ne ricevis informojn de regulaj organizantoj, ke ili havas ankoraux sxancon sendi informon pri la planataj arangxoj al la retadreso chrdle@kava-pech.cz kaj ili estos ankoraux envicigitaj.

Tamen, jen almenaux la arangxoj, kiuj okazos en la plej proksimaj monatoj:

2003-04-11/13 la 11-a Adonido en Vracov. Turisma renkontigxo kun cespera dauxrigo en vinkelo. Kontakto: "Jana_Melicharkova" <melicharkova@quick.cz>

2003-05-12/18 Lingva seminario organizita de AEH (Asocio de Esperantistoj-Handikapitoj), Skokovy, kontakto: drahotovaesperanto@centrum.cz

2003-06-07: REgiona renkontigxo en Svitavy (omagxe al 70-jarigxo de Esperanto en la urbo). Kontakto: (cxu Liba Dvo=F8=E1kov=E1?)

2003-07-12/18: EKOTUR 2003 (Ekoturisma Renkontigxo) en Karl=B9tejn kun migrado tra Bohemia Karsto. Kontakto: chrdle@kava-pech.cz

2003-07-19/25: IEK 2003 (Internacia Esperanto-konferenco de OSIEK) kun la temo "Intimaj temoj en Esperanto-beletro. Kontakto: chrdle@kava-pech.cz

2003-07-26/08-05 Flugkaravano al la Universala kongreso de Esperanto al Gotenburgo kun tritaga postkongreso en Kopenhago sub gvido de danaj esperantistoj. Kontakto: chrdle@kava-pech.cz

2. Tutmonda adresaro de esperantistoj ne plu!

Laux la sciigo de la prizorginto de la tutmonda adresaro de esperantistoj kaj Esperanto-organizajxoj Derk Ederveen pro sxangxigxanta mondo, en kiu jam estas amasego da retemuloj kaj la amplekso atingas ne plu redakteblan grandecon, la adresaro ne plu estos tenata. Gxi tamen ankoraux estas elsxutebla cxe <http://home.wxs.nl/~lide/adresaro.htm>

La adresaro ekzistis kaj estis regule aktualigita ekde la jaro 1993 kaj certe estis granda helpilo en pioniraj jaroj de la interreto.

3. Videofilmo pri nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard Selten

Filmo pri Profesoro Reinhard Selten

Pli malfrue ol esperite aperis 55-minuta videofilmo en kiu d-ro r Kurz iinervjuas la Nobelpremiiton pri Ekonomio 1994.

Post mallonga impreso pri Bonn cxe la Rejno, la tiea Altlernejo pri Ekonomiko, ties laboratorio, kaj la domo de prof. Selten in K=F6nigswinter, la videobendo plenigxas per la tre interesa intervjuo al kiu Rainer Kurz submetas la nun 73-jaran profesoron. Pri lia vivo, laboro, esperantismo ..

La videofilmo estas gxuste nun fabrikita kaj eblas gxin mendi cxe: Dr. Rainer Kurz, Rainer-Kurz@web.de. La prezo estos maks. EUR 8,- + sendokostoj kaj eblos gxin pagi per cxehxaj kronoj. Tamen, la aligxilojn necesas sendi al la retadreso de d-ro Kurz gxis la fino de marto, ke estu konate, kiom da videofilmoj bezonatos produkti.